

PRITAKSO DE JUNULARA PARTOPRENO EN LA REGIONOJ DE EŬROPO



**Liveraĵo de la teamo 1: Antoine Cocard, Guaroa Emmanuel González Cuevas kaj
Óscar Hernández Rodríguez
Subtena trejnisto: Léon Kamenický**

Dato: 25a de Junio 2022

Loko: Arrout, Francio.

Enkonduko:

La junuloj en Eŭropo havas malsimilajn situaciojn se ni komparas inter landoj. La partopreno de junuloj en demokratiaj institucioj estas unu el la fokuso kiujn la trejnado prenis por montri la situacion de la voĉo de junuloj rilate al ilia kvanto/procento en la socio, balotadoj, publika reprezentado en parlamentoj, inter aliaj. Tiujn ĉi punktojn ni devas ankaŭ rilatigi kun la malsimilaj manieroj kiujn junuloj havas por partopreni en nia socio, ne nur en oficialaj institucioj sed ankaŭ en neoficialaj medioj kiel sociaj retoj, publika spaco, manifestacioj, pli formalaj kiel asocioj, junularaj konsilioj, inter aliaj.

Ankaŭ gravas montri ke en tiu situacio pluraj asocioj, institucioj, kaj publikaj kaj privataj, jam strategie planis aktivajn, eventojn, spaciojn, kreis aliajn instituciojn aŭ mediojn por solvi la situacion de subreprezentado de junuloj.

Tiu ĉi trejnado celis enkadrigi la situacion de junuloj teorie per datumoj kaj ankaŭ montri la eblojn kiujn la socio, sed ĉefe junuloj, havas por partopreni kaj altigi la efikon de siaj voĉoj en nia socio. Bonaj praktikoj kiel kreado de junularaj konsilioj, edukado pri demokratio, kreado de iloj por interparolado kun junuloj kaj politikistoj, inter aliaj ankaŭ devas esti konsiderataj por utiligi ilin en aliaj spacoj, landoj aŭ regionoj en Eŭropo.

Enhavo:

1. Interkompreno de la nuna situacio de la partopreno de junuloj en la demokratio.

Celoj: Analizi la situacion de junulara agado en diversaj landoj de Eŭropo.

La unua parto de la trejnado celis montri la ĝeneralan situacion de junuloj rilate al pluraj indeksoj en 4 malsamaj landoj, nome Finnlando, Pollando, Hispanio kaj Francio. Tiuj ĉi landoj montris ke la situacio de junuloj ĝenerale en Eŭropo estas simila laŭ regionoj. La diferencoj en la reprezentado de junuloj en parlamentoj, procento rilate al la tuta socio aŭ minimuma aĝo por esti elektita kiel publika reprezentanto estas simila kaj inter suda/norda Eŭropo kaj Orienta/Okcidenta Eŭropo.

Hiapanio¹

1. % junuloj rilate al la tuta socio: 15%
2. % junuloj en parlamentoj: 3,14%
3. Ekde kiam junuloj povas esti elektitaj: 18 jaraĝa

Fillando

1. % junuloj rilate al la tuta socio: 17,8%
2. % junuloj en parlamentoj: 3,5
3. Ekde kiam junuloj povas esti elektitaj: 18 jaraĝa

Pollando

1. % junuloj rilate al la tuta socio: 18,2%
2. % junuloj en parlamentoj: 3,1%
3. Ekde kiam junuloj povas esti elektitaj: 21 jaraĝa

Francio

1. % junuloj rilate al la tuta socio: 17,7%
2. % membroj en parlamentoj: 0%²
3. Ekde kiam junuloj povas esti elektitaj: 18 jaraĝa

Rilate a la aĝo en kiu junuloj povas esti elektitaj kiel reprezentoj en parlamento aŭ senatoj, gravas mencii la situacion de aliaj landoj kiel Slovakio, Irlando aŭ Kiprio, kie same kiel en Pollando junuloj povas esti elektitaj ekde 21 jaraĝa. Rumanio plialtiĝas la aĝon ĝis 23 jaroj. Italio kaj Grekio fiksas en 25 jaroj la minimuman aĝon.

La dua parto de ĉi tiu sesio celis montri al la partoprenantoj diversajn manierojn je partopreno en la socio. Unu el la ĉefaj celoj estis videbligi aliajn ilojn por ke junuloj partoprenu, tio estis tiel ĉar kutime voĉdonado en balotadoj estas la sola maniero kiun pluraj homoj komprenas kiam oni parolas pri partopreno en demokratio. Ni parolis pri asocioj, protestaj movadoj, sociaj retoj, publikaj spacoj kaj neformalaj iloj.

Diversaj formoj de politika partopreno³

- Balotado
- Junularaj konsilioj, asocioj, kluboj
- Politika Pledado
- Protestaj Movadoj
- Sociaj retoj
- Alternativaj uzoj de publika spaco
- Balotado

¹ Vi povas trovi pli da informo pri tiuj kaj aliaj landoj ĉi tie

<https://national-policies.eacea.ec.europa.eu/youthwiki/chapters/poland/overview>

² Tiu situacio povis ŝanĝi en la balotado de 2022

³ Kio estas politika partopreno

https://www.youtube.com/watch?v=GHe6TMMJmDQ&ab_channel=EU-CoEYouthpartnership (angle)

Ĝenerale la ĉefa ideo de la lasta aktivaĵo estis montri, ke ĉio en niaj vivoj estas politiko aŭ tuŝas politikon per unu aŭ alia flanko. Ekzemple nia maniero manĝi (ekologie, manĝi viandon aŭ manĝi vegane), nia partopreno en asocio (eĉ se ne estas politika asocio), ekologiaj protestoj... estas manieroj politike partopreni.

Vi povas trovi pli da ekzemploj kaj pli vaste lerni pri tio en la sekvaj ligiloj.

<https://www.youtube.com/playlist?list=PLKNmrID6g-JuM7jXxzpOhZbtH1OI97LW8>

<https://www.youthforum.org/>

<https://www.coe.int/en/web/youth>

https://europa.eu/youth/home_en

2. Bonaj kaj malbonaj praktikoj.

Celoj: Pripensi la faktorojn kiuj povus bremsi la junularan partoprenon en socio, kaj poste kune identigi bonajn praktikojn kiujn ni, kiel civitanoj, kaj ankaŭ registaroj devus apliki por instigi tiajn partoprenojn.

La unua parto de tiu ĉi trejnadero montris aron da kelkaj problemoj rilataj al junulara partopreno. Ni mallonge pridiskutis ilin.

- **Sento ke partioj ne bone reprezentas junulojn.** Ni alvenis al pripenso, ke multaj junuloj havas la impreson ke politikaj partioj fokusas sian agadon je plenkreskuloj, iom flankenlasante junulojn, kiuj aldone malabundas en la responsularoj de partioj. Kelkaj ĉeestantoj ankaŭ substrekis la fakton, ke estas tendenco ke junuloj estu pli idealismaj, kaj plenkreskuloj pli pragmataj; tiu faktoro povas fari ke junuloj havu certan malemon voĉdoni kiam ne estas partio kiu plene kaj tutkontentige reprezentas ilin.
- **Pli malgranda partopreno de junuloj en malfacile alireblaj loĝlokoj kaj malriĉaj familioj.** Ni diskutis pri la fakto, ke junuloj kiuj loĝas en familioj kun gravaj ekonomiaj problemoj kutime havas malpli da emo aŭ eblo partopreni en sociaj movadoj, politiko ktp. Ĉar ili havas pli urĝajn kaj pli ĉeajn problemojn kiujn ili devas prizorgi. Krome, ekzistas ankaŭ la problemo, ke ofte la agado de asocioj kaj junulaj movadoj okazas preskaŭ nur ĉirkaŭ grandaj urboj, do homoj loĝantaj en foraj lokoj havas malpli da ŝanco partopreni.
- **Multaj junuloj ne konas junularajn strukturojn.** Okazas tio, ke kvankam multaj junuloj havas sociajn, politikajn kaj alispecajn zorgojn kaj interesojn, kelkaj el ili ne konas la ekziston de organizitaj movadoj, asocioj, kaj aliaj strukturoj (kiel ekzemple junularaj konsilioj) en kies agado ili povus partopreni.

Tiu problemo montras mankon de videbleco aŭ diskonigo de tiaj strukturoj al junuloj.

- **Multaj junuloj malkonsentas pri la funkciado de demokratio.** Ni pridiskutis la fakton, ke certaj junuloj povas perdi sian emon partopreni en politikaj demokratiaj procedoj pro seniluziigo kaŭzata de korupteco, malhonesteco kaj fiagoj de certaj politikistoj. Ankaŭ ekzistas la impresoj ke kelkaj junuloj, ke ilia partopreno ne estus sufiĉe utila kaj fruktodona kaj ĝi ne kapablas havi realan influon aŭ efikon en la socio.

Post diskuti kaj iom debateti pri tiuj problemoj, ni prezentis kaj analizis kelkajn bonajn praktikojn kiuj povas oferi solvon al tiaj problemoj kaj fortigi la junulan partoprenon.

- **Aplikado de demokratio en edukado.** Estas konsilinde ke dum formala kaj neformala edukado oni komencu apliki kutime praktikojn bazitajn sur demokratiaj valoroj, homaj rajtoj, esprimlibereco, diverseco, ktp. por ke junuloj perceptu ilin kiel gravajn aferojn kaj poste ili pli facile restu engaĝitaj en socia kaj politika partopreno.
- **Uzado de retaj iloj.** En la nuntempa mondo ekzistas multaj retaj iloj kiuj povas esti uzataj je la servo de junula partopreno. Unuflake, en kelkaj cirkonstancoj retaj voĉdonadoj povas esti utilaj por faciligi partoprenon (ekz. kadre de asocioj), kaj aliflanke reta agado povas malgrandigi la problemon pri junuloj kiuj loĝas for de grandaj urboj kaj havas malpli da oportunoj partopreni. Aldone, retaj iloj faciligas internacian kunagadon kaj helpas diskonigi la agadon de organizoj.
- **Junularaj konsilioj.** Ni prezentis la ekziston de tiuj strukturoj kiuj kunigas kaj kunordigas plurajn junularajn organizojn ene de teritorio (ĉu urbo, regiono, lando, kontinento,...), kaj ni parolis pri kial ili estas utilaj. Estas grave diskonigi ilin ĉar ili ebligas ke la zorgoj, petoj kaj agadoj de junuloj atingu registarojn kaj decidfarantojn, kaj ili helpas la kunlaboradon inter malsamaj junularaj asocioj kaj fortigas iliajn ligojn, ebligante pli ofta, riĉa kaj fruktodona agado.
- **Instruado pri kritikaj serĉado kaj analizo de informo.** Jam dum la diskuto pri retaj iloj oni levis tiun punkton. En la nuntempa mondo bedaŭrinde malveraj

novaĵoj ne malabundas, do ni devas bone konscii pri tiu problemo kaj lerni kiel alfronti ĝin: filtri informojn, serĉi la fontojn kiaj pritaksi kiom finindaj ili estas, ktp. Instruado kaj ekzerciĝo de tiaj kapabloj devas okazi jam dum lerneaj jaroj.

- **Pritaksi la indecon de pli juna partopreno en balotadoj.** Ni antaŭe menciis ke kelkaj junuloj povas senti ke multaj leĝoj, debatoj kaj agadplanoj de politikistoj ne koncernas ilin, sed nur plenkreskulojn. Kelkaj landoj enkondukis debatojn pri la indeco de pli malalta aĝlimo por partopreni en balotadoj (ekz. 16 jaroj).

La jenaj ligiloj montras kelkajn ekzemplojn de bonaj praktikoj, kaj jam cititajn kaj novajn:

https://www.salto-youth.net/downloads/4-17-4089/20200929_ParticipationStrategy_Online_Final_02.pdf

[https://eur-lex.europa.eu/legal-content/EN/TXT/PDF/?uri=CELEX:42015Y1215\(02\)&rid=3](https://eur-lex.europa.eu/legal-content/EN/TXT/PDF/?uri=CELEX:42015Y1215(02)&rid=3)

3. Interŝanĝo de ideoj.

Fine de la trejnado ni faris moviĝdebatojn tian, ke komence la partoprenantoj ne konsciis pri la fakto ke temis ja pri moviĝdebato.

Ni unue donis al ili 3 malgrandajn glupaperojn kaj poste ni faris al ili 3 demandojn. Ili devis skribi numeron (laŭ sia konsento pri la aserto) per sekreta baloto. Ĝi estis sekreta por ke ili respondu plej komforte, kaj ili ne sentu sin amase influitaj de aliuloj.

Iliaj respondoj varias de 1 (ili plej malkonsentas) ĝis 9 (ili plej konsentas).

Sur la planko estis etendita ŝnuro kun la numeroj de 1 ĝis 9. Post kiam la 3 demandoj estis faritaj, ni tiam petis al ili meti la paperetojn pri la unua demando ĉe la ŝnuron. Tiam ili povis doni sian opinion pri sia decido kaj ŝanĝi lokon se ili estis konvinkitaj de la argumentoj de aliaj homoj. Ni petis al homoj doni ankaŭ sian opinion pri eventuala lokŝanĝo. Sekve ni faris tion por la aliaj du demandoj.

La demandoj estis la jenaj:

1. Ĉu devas ekzisti kvotoj por junuloj en parlamentoj?

Pri tiu ĉi temo, kelkaj homoj kiuj konsentis argumentis, ke kvotoj povas garantii ke malplimultoj havu ŝancon esprimi sin, ĉar alie ili ne povus. Homoj kiuj malkonsentis opiniis ke kvotoj povas malpliigi la demokratiecon de balotadoj, ĉar iu homgrupo jam antaŭhavas certan reprezenton.

2. Ĉu ni devas devigi voĉdonadon en demokratiaj sistemoj?

Unu el la ĉefaj kontraŭaj argumentoj pri ĉi tiu punkto estis ke ne partopreno en balotadoj estas ankaŭ valida maniero esprimi sin politike, ĉar ekzemple kelkaj homoj esprimas sian malkontenton pere de sindeteno. Unu el la argumentoj de la homoj kiuj konsentis pri deviga voĉdonado estis ke ĝi povas helpi partoprenon de homgrupoj kiuj sindetenas ne ĉar ili politike decidas tiel fari, sed pro aliaj kialoj (ekzemple ĉar ili vivas marĝenigite kaj ili havas pli urĝajn bezonojn ol voĉdoni), kaj tiel eviti ties subrepresentadon.

3. Ĉu junuloj inter 16 kaj 18 jaraĝaj devas havi la rajton voĉdoni?

Pri tiu ĉi punkto unu el la ĉefaj ideoj kiu estis debatita dum la debato ne temis nur pri altigi aŭ ne la aĝlimon sed pri la kondiĉoj kiujn oni devas postuli al la junuloj se oni decidas malaltigi la aĝlimon. Laŭ kelkaj partoprenantoj junuloj devas havi informon, facilan aliron al tiu informo kaj devas esti lertaj homoj kiuj devas esti pretaj por neŭtrale klarigi kiel funkcias la sistemo, ĉar gravas ke junuloj partoprenu kaj ke ili konu ĉiujn eblojn. Tio devas okazi por eviti manipuladojn aŭ misinformadon de la junuloj inter 16 kaj 18 jaraĝaj en la momento voĉdoni.

Tia debato celis kompreni la opiniojn de aliaj homoj, ĉar eĉ se ili ne ŝanĝas sian opinion, ili povas pli bone kompreni tiujn de aliuloj.


La debato elmontris ke kutime kelkaj temoj estigas tre diversan aron da opinioj, kaj por homoj estas malfacile esprimi sian opinion per nura numero: ili sentis grandan bezonon nuanci sian decidon kaj aldoni komentojn kaj klarigojn.

Ankaŭ oni povis sperti la influpovon de ĉirkaŭuloj: malsamkiel en aliaj moviĝdebatoj kie homoj polusiĝas en nur unu aŭ du opinioj, en nia debato estis tre diversa aranĝiĝo de homoj laŭ la longeco de la ŝnuro, pro tio ke la voĉdonadoj estis sekretaj kaj homoj ne povis esti influitaj.


Aneksa;



Superrigardo de la videbligaĵoj kiuj estis montritaj dum la trejnado.



Sur la mapo estis montritaj datumoj pri la kvanto da junuloj en la socio, ankaŭ la procento de junuloj en la parlamentoj kaj fine la minimuma aĝo en kiu oni povas esti elektita membro de parlamento aŭ senato. Ĉio rilate al 4 landoj: Finnlando, Francio, Hispanio kaj Pollando.



Videbligo de la dua parto de la trejnado. Maldekstre, montriĝas flave la problemoj rilataj al junula partopreno, kaj dekstre estas kelkaj bonaj praktikoj kiuj povas helpi instigi kaj fortigi tian partoprenon.



Debato inter la partoprenantoj dum la lasta parto de la trejnado. La ĉefa celo estis interŝanĝi opiniojn kaj ideojn kaj identigi aliajn fokusojn pri la debatitaj temoj.